



2011-01

Januaro 2011

ISSN-1612-7927

ina-asocio@web.de

www.ina-asocio.info

€ 3,50

INA 25-jara ni festu dum la 4-a INA-Konferenco

The cover features the INA logo at the top left. To its right, it says: "La naturkuraca revuo por fakuloj, pacientoj kaj interesuloj sur 2004-03 • Julio 2004 ISSN 1612-7927 ina-asocio@web.de www.ina-asocio.com". Below this is a small red apple logo with the text "La rilatoj por la UK en Pekino". The main title "Naturkuracado en la mondo" is in large black letters. Below the title is a photograph of two men in white lab coats examining a patient lying in a hospital bed. At the bottom, there is a list of articles:

- Reskoviĝo inter aliaj aferoj ekde la 1986. La fero kursa kuracado per tradicia korea medicino ĉi-va Parte de Ĉiang Ĥondok, de la germana elstaranta, naturmedicina kuracisto Harald Schicke, diagnozas bone – per korea diagnozo, kiam ŝi lernas en Koreio en la kliniko de la majstro. Legu ĝi sur paĝo 13.
- Diabeto – la nova epidemio en industriaj landoj. La medicino estas senhelpa, sed naturkuracado efektiva. Legu ĝi sur paĝo 4.
- Abeloj, abelaj produktoj kaj iliaj kuracaj ecoj. Legu ĝi sur paĝo 15.
- Helpu al via sano – fariĝu membro de INA. Legu ĝi sur paĝo 52.

INA-emblemo el la jaro 1986, kiam INA nomiĝis ankoraŭ ENA.



Aliĝu al la 4-a INA-Konferenco en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, Germanio, de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 2011. Detalojn vi trovas je www.ina-asocio.info

La plej ampleksa INA-revuo kun 52 koloraj A4-paĝoj aperis je UK en Pekino en 2004.

Kio estas piedomasaĝo?

de WANG Minhao, Ĉinio

La problemo „Kio estas piedo masaĝo?“ estas iel disputebla. Neniu sciis, kiam ĝi komencis aŭ kial ĝi efikas. Tial kiam oni postulis, ke mi klarigu, kio planda masaĝo estas, mi iomete baraktis. Kvankam mi por ne longe praktikas piedomasaĝon, mi tamen havas apartan afekcion al ĉi tiu arto.

La ĉina medicino

La ĉina medicino ne havis detalan eksplikon pri piedomasaĝo. Sed de la kuracanta vidpunkto, ĝi estas ia ekstera kuracada metodo, aplikante teknikon al la kurata homa korpo. Nun la plej konata libro pri piedo masaĝo estis farita de Pastro Wu.

Laŭ anatomio

Laŭ anatomio de homa korpo, la precipaj funkcioj de la plando estas subteni la pezon de tuta korpo, ekvilibrigi ĝin, piediri, kuri, salti, kaj fari aliajn malpli gravajn funkciojn. Aliflanke la partoj de la korpo plej distancaj de la koro estas la plandoj. Tial la plandoj

kontribuas al la faktoroj de malsanemo.

Sekvaj estas studoj aperintaj en ĉinaj klasikaj libroj pri medicino:

- la metodo ekzameni piedfin-grojn en „La Enaj Instruaĵoj“ de *Huangdi*
- la principo pri plandaj centroj en „Sekretaj Kajeroj“ de *Hua Tuo*.

Tri ĉefaj principoj de piedomasaĝo

Teorio

- principo de reflekso
- principo de cirkulado
- principo de ekvilibro

Laŭ ĉina medicino

- teorio de meridianoj
- cirkulado de vitala energio kaj sango
- ekvilibro inter pozitivo kaj negativo
- internaskigo kaj interdeteno de la kvin elementoj

Laŭ okcidenta medicino

- teorio de nerva reflekso
- teorio de sanga cirkulado
- teorio de ekvilibro de interna sekretado

La plandoj

La plandoj estas la partoj de la korpo plej malproksimaj de la koro. En la plandoj amasas multaj kapilaraj sangovazo, kiuj tie interŝanĝas sangofluojn kun la arterio. En la plandoj ankaŭ amasas multaj kapilaraj nervoj. Tial ili havas gravajn efikojn je la transporto de cirkulado, metabolo kaj nerva impulso.

La piedomasaĝo povas reguligi la vitalan energion kaj sangon, pliigas la imunan kapablon, disvolvas la mekanismon de aŭtomata reguligo, kaj plibonigas la farton. Unuvorte, la planda masaĝo bone helpas prizorgi sanan vivon.

Funkcioj de piedomasaĝo

- Reguligi la biologiajn informojn kaj ŝanĝi enan energion de la internaj organoj

- Reguligi vitalan energion kaj sangon, stimuli cirkuladon kaj pliigi imunan kapablon
- Diagnozo kaj antaŭgardo

Aplikado de piedomasaĝo al ofte renkontataj malsanoj de homa korpo

Sistemo de digesto

Buŝa fiodoro

- masaĝu ĉe refleksaj regionoj de reno, uretero, urinveziko, kaj stomako, intesto, hepato, ezofago

Stomaka aŭ duodena ulcero

- masaĝu ĉe refleksaj regionoj de reno, uretero, urinveziko, kaj stomako, duodeno, abdomena plekso, paratiroida glando, la limfaj glandoj de supra kaj suba partoj de korpo.

Stomaka doloro

- masaĝu ĉe refleksaj regionoj de reno, uretero, urinveziko, kaj stomako, dika kaj maldika intestoj, abdomena plekso, la limfaj glandoj de supra kaj suba partoj de korpo.

Tromulta gaso en stomako aŭ intesto

- masaĝu ĉe refleksaj regionoj de reno, uretero, urinveziko, kaj stomako, dika kaj maldika intestoj, abdomena plekso, diafragmo, koro, paratiroida glando.

Kronika gastrito

- masaĝu ĉe refleksaj regionoj de reno, uretero, urinveziko, kaj stomako, duodeno, koro, galo, paratiroida glando.

Urina sistemo

Edemo

- masaĝu ĉe refleksaj regionoj de reno, uretero, urinveziko, kaj paratiroida glando, koro, hepato, pulmoj.

Organoj de sento

Kapturino, vetura kaj mara kininezopatio



- masaĝu ĉe refleksaj regionoj de reno, uretero, urinveziko, kaj nervo de ekvilibro.

Kapdoloro

- masaĝu ĉe refleksaj regionoj de hipofizo, reno, uretero, urinveziko, stomako kaj tri muskoloj ĉirkaŭ la kapo.

La punktoj

1. nazkavoj
2. pituitaria glando
3. nazo
4. cerbo
5. tempioj
6. cerbeto
7. kolo
8. okuloj (dekstra okulo sur maldekstra piedo, kaj maldekstra okulo sur dekstra piedo)
9. oreloj (dekstra orelo sur maldekstra piedo, kaj maldekstra orelo sur dekstra piedo)
10. paratiroida glando
11. tiroida glando
12. korona muskolo
13. pulmo, trakeo
14. ŝultro
15. tempia nervo
16. stomako
17. intesto
18. pankreato
19. koro, hepato
20. surrena glando
21. reno
22. spleno
23. transversa kojlo
24. malleviganta kojlo
25. uretero
26. intesto
27. genuoj (dekstra genuo sur dekstra piedo kaj maldekstra genuo sur maldekstra piedo)
28. rektumo
29. anuso




30. veziko

31. testiko (por viro), ovujo (por virino)



- | | |
|---|------------------------|
| 1. rektumo | 16. paratiroida glando |
| 2. iksia nervo | 17. kolo |
| 3. anuso | 18. nazo |
| 4. ingveno | |
| 5. oduko | |
| 6. ripoj | |
| 7. limfa glando de malsupra parto de la korpo | |
| 8. femura artiko | |
| 9. prostato, utero | |
| 10. interna kokcigo | |
| 11. penis, vagino | |
| 12. kokcigo | |
| 13. lumbo | |
| 14. brusto | |
| 15. urinveziko | |



- | | |
|---|---------------------------------|
| 1. limfaj glandoj de ka malsupra parto de korpo | 14. diafragmo |
| 2. iksia nervo | 15. ŝultro |
| 3. anuso | 16. interna orelo |
| 4. ingveno | 17. brusto |
| 5. ovoidukto | 18. limfaj glandoj de la brusto |
| 6. ekstera kokcigo | 19. gorĝo, trakeo |
| 7. testiko, ovujo | 20. tonsiloj |
| 8. femuraj artikoj | 21. malsupra makzelo |
| 9. limfaj glandoj de la supra parto de la korpo | 22. tempia nervo |
| 10. ripoj | 23. koro |
| 11. genuoj | |
| 12. skapolo | |
| 13. kubuta artikoj | |

INA-revuo estas la oficiala organo de Internacia Naturkuraca Asocio (INA)

Ĉefredaktoro kaj eldonisto:
Harald Schicke
Adreso de INA:
Harald Schicke (prezidanto)
Hauptstr. 38
37412 Herzberg am Harz -
la Esperanto-urbo, Germanio
mzverlag@web.de
www.ina-asocio.info

Adreso por korespondado kaj membroadministrado:
Rosa Ebel (sekretariino)
Schmiedestr. 99
47809 Krefeld, Germanio
ina-asocio@web.de

Ankaŭ malgranda revuo vivas de la kunfarado de siaj legantoj kaj de la artikoloj de kompetentaj fakuloj.

Tial ni petas vin sendi al ni viajn manuskriptojn. Koran dankon!

Karaj membroj de INA

Tiu ĉi estas la jubilea jaro de Internacia Naturkuraca Asocio. Estas do tempo danki al ĉiuj, kiuj per siaj kontribuoj dum 25 jaroj vivigis nian asocion.

Ni ĉiuj povas fieri pri la atingoj de INA, niaj interesaj kunsidoj dum UKoj, niaj konferencoj kun prelegantoj el diversaj landoj, nian regule aperantan revuon kaj nian elstaran prezenton en la reto.

Estas ankaŭ tempo por pensi pri la venontaj 25 jaroj kaj resumi, kio mankas al INA. Ni bezonas pli da membroj, financan bazon pli solidan kaj precipe pli multe da kunlaborantoj.

Ĉiu el ni konsideru, kion li aŭ ŝi povus kontribui por havi pli ampleksan revuon.

Tiam INA bonfartos ankaŭ dum la venontaj 25 jaroj.

Harald Schicke
Prezidanto de INA

Saniĝo per spirita vojo laŭ la instruo de Bruno Grö- ning – medicine pruvita kaj dokumentata

de Dr. med. K. Bükler

Resumo

La Amikaro Bruno Gröning mondvaste estas unu el la plej grandaj asocioj por saniĝo per spirita vojo. Ĉi tie interesiĝantoj kaj helposerĉantoj lernas akcepti naturan forton. Dum tio ofte okazas mirigaj saniĝoj eĉ de longjardaŭraj korpaj ŝarĝoj. Tiuj estas pruvitaj kaj dokumentataj de kuracistoj, fakkuracistoj, naturkuracistoj kaj apartenantoj de aliaj saniĝprofesioj, kiuj en la Amikaro Bruno Gröning estas unuiĝintaj kiel Medicina-Sciencfaĝgrupo (MWF). La medicina pruvo per dokumentoj de la sukcesraportoj okazas laŭ la principoj de la klinika anamnezo kaj pere de la antaŭa kaj posta ekzameno per sendependaj kuracistoj. Ekde kelkaj jaroj la kuracistoj de la MWF krome faras internaciajn fakprelegojn dum Esperanto-kongresoj.

Kapvortoj: Saniĝo per spirita vojo, Amikaro de Bruno Gröning, Medicina-Sciencfaĝgrupo.



Kun la kreskanta konscia akcepto de la komplementa medicino,

la ebleco de saniĝo per spirita vojo altiras la atenton ankaŭ en medicinaj fakgrupoj. Per tio ĉiam denove aperas la nomo de Bruno Gröning (1906-1959). Li mondvaste altiris la atenton en la jaroj 1950 per eksterordinaraj saniĝaj sukcesoj, kaj postlasis la scion pri la akcepto de la spirita forto. Jam en la iamaj kulturoj de la homaro oni parolis pri la ekzisto de iu supera forto, kiu povas helpi kaj sanigi. Bruno Gröning nomis tiun naturan forton la „Heilstrom“ (saniga energio).

En la Amikaro Bruno Gröning kunvenas interesiĝantoj kaj helposerĉantoj el la plej diversaj kulturoj kaj religioj, por kune akcepti la Heilstrom. Nuntempe la Amikaro entenas pli ol 60.000 homojn. Estas komunumoj en pli ol 70 landoj. Per tio la Amikaro Bruno Gröning mondvaste estas unu el la plej grandaj asocioj pri saniĝo per spirita vojo. Ĉiuj aktivecoj estas farataj senpage, kaze se io havas kostojn, tiuj estas pagataj per libervolaj donacoj. Grava punkto de la instruo de Bruno Gröning estas respekti la liberan volon. Tial ĉiu povas forlasi la Amikaron ĉiam

ajn, ne estas financaj aŭ juraj ligoj.

Per la akcepto de la Heilstrom ofte okazas mirigaj saniĝoj eĉ de longjaraj ŝarĝoj. La saniĝoj estas ekzamenitaj, dokumentitaj kaj arkivitaj per la Medicina Scienca Fakgrupo (MWF) de la Amikaro Bruno Gröning. La medicina pruvo per dokumentoj de la sukcesraportoj okazas laŭ principoj de la klinika anamnezo kaj pere de la antaŭa kaj posta ekzamenoj de sendependaj kuracistoj. En la lastaj jaroj tiel eblis kunmeti ampleksan arkivon. Tiu impreso dokumentas, ke saniĝo per spirita vojo eblas eĉ je degeneraj ŝarĝoj kiel montras la sekvanta kazo.

Saniĝo de ostoporozo

Gertrud Fischer (67j), Munkeno, Germanio

En la jaro 1994 mi iris al la kuracisto pro fortaj, lancinaj kaj obtuzaj dorsodoloroj, kiujn mi suferis senĉese ekde ĉirkaŭ unu jaro, kaj kiuj malhelpis min dum la laboro. Mi krome havis lancinajn dolorojn en la mezaj fingroartikoj kaj speciale en la ge-

nuoj, tiel ke dum starado foje mi fleksiĝis. Ĉiuj tiuj doloroj estis ĉiam senteblaj. Mi preskaŭ ne kapablis labori. La kuracisto faris ekzamenon de la ostodensoj kaj diagnozis ostoporozon en progresa fazo. Tial unue mi devis fari estrogenan kaj kalcian terapion. Mia korpo ne toleris la kalcion kaj malmulte post la estrogena/kalcia terapio okazis trombozo, tiel ke tiu terapio estis ĉesigata. Tiam mi prenis sole "vitamino D" tablojdojn, sed la doloroj ne malmultiĝis. Ĉe la regula mezurado de la ostodensoj, malgraŭ la aplikitaj rimedoj oni konstatis plian regreson de la ostodensoj t.e. la ostoporozo ĉiam pli progresis. Mi estis senespera, mi ofte ploris kaj timis la estonton. Pro la trombozo mi tute ne plu povis preni hormonojn.

Per najbarino mi trovis la vojon al la Amikaro Bruno Gröning en Aprilo 1996. Komence mi estis tre malkonfida. Sed mi okupiĝis intense pri la instruo de Bruno Gröning kaj pri la temo saniĝo per spirita vojo. Kiel konsilite, mi akceptis la forton dufoje ĉiutage kaj mi deziris la tutan sanon de la korpo kaj animo. Ekde tiam iom post iom mi sentis plibon-

niĝon. La dorsodoloroj malaperis dum kelkaj monatoj. Sed fojfoje mi ankoraŭ havis lancinajn dolorojn, kiuj similis al la iamaj ŝarĝoj, sed ili aperis pli malofte kaj malforte kaj post kelkaj monatoj ili estis tute malaperintaj. Same estis al la manoj kaj genuoj. La doloroj fariĝis iom post iom pli malmultaj, ĝis mi ne plu pensis pri ili.

Kuracista komentario:

S-ino Fischer priskribas klare la dolorsimptomon. Ostodensitometriro, farita en la jaro 1994 klare konfirmis la diagnozon: ostoporozo. Kiel estas videble el la dokumentoj, la preno de kalciaj kaj estrogenaj kuraciloj kaŭzis maldekstran femurvejnan trombozon. Post tio tiu terapio estis ĉesigata.

En la jaro 1994 estis mezurataj 64,2 (mg CaHA/ml) ostaj mineralaj saloj en la lumba vertebra-ro, kiu rezulto estas klare sub la aĝnormo. La pliaj priostodensaj mezurad-kontroloj montris klare progresan ostoporozon. En 1997 la rezulto estis 63 (mg CaHA/ml). Septembron de 1998 la spongioza-mineralaj saloj en la regiono de la lumba vertebra-ro malpliĝis, la rezulto de la ek-

zamenado estis je 49,3 (mg CaHA/ml).

En Aprilo de 1999 oni povis konstati subitan kreskon de la ostodenso. La meznombro de la spongioza-mineralaj saloj mezurata per la sama radiologo estis 80,1 (mg CaHA/ml). La nuna nivelo de ostodenso troviĝas ene de unu de la referencotolero laŭ aĝo kaj tiel pruvas impreso la okazintan resaniĝon. La kompleta malkresko de la longjardaŭraj dolorsimptomoj jam kelkajn monatojn post la enkonduko en la instruon de Bruno Gröning, kaj la granda kresko de la ostodenso dum la daŭro de ok monatoj, medicine ne estas klarigeblaj.

Dr. med. M. K., kuracisto

La Medicina-Scienca Fakgrupo en la Amikaro de Bruno Gröning estis fondata en la jaro 1992 kaj nuntempe enhavas kelkajn milojn da kuracistoj, fakkuracistoj, naturkuracistoj kaj apartenantoj de aliaj kuracprofesioj de la en-kaj eksterlando. La fakuloj, kiuj kunlaboras en la MWF, faras tion senpage dum sia libera tempo. Estas ilia deziro doni la eblecon konvinkiĝi al kiel eble plej multaj profesiaj kolegoj, ke la instruo de Bruno Gröning an-

kaŭ por ili estas sinriĉigo por ilia aktiveco aŭ ke povas konduki al la propra sano. Pere de propra ĵurnalo tradukita en 13 lingvojn, eblas persona interŝanĝo inter ĉiuj landoj. La scio pri la ebleco de saniĝo laŭ spirita vojo per la instruo de Bruno Gröning estas transdonata mondvaste per universitataj prelegoj kaj en fak-kongresoj.

De 1994 homoj el la Amikaro Bruno Gröning lernas Esperanton kaj partoprenas Esperanto-kongresojn. La ideo „Esperanto” de la eltrovinto D-ro Zamenhof en la Amikaro Bruno Gröning estas ege aprezata kaj subtenata. Ekde kelkaj jaroj kuracistoj de la MWF faras fakprelegojn dum Esperanto-kongresoj – kaj lastfojon ĉe la Universala Kongreso en Pollando (2009). Pri tiuj prelegoj la esperantistoj treege interesiĝas. Kelkaj ĉeestantoj mem spertis helpon kaj saniĝon.

Pliajn informojn:

www.bruno-groening.org

Adreso:

Edith Henrici

Rheinstraße 41

57632 Flamersfeld

e.henrici@t-online.de